

PACON AL LA HOMA GENTO!

Centmilionoj da homoj unuiĝis en la batalo por la estonteco de l' homaro.

Jan Drda:

LA PLEJ BELA Batalo DE L'HOMARO


Sinjoro Clement Attlee estas el inter la vasalaj servistoj de l'usona imperiismo nek la unua nek la lasta, al kiu estis destinite malvenki ĉe la kolizio kun la tutmonda movado de pacdefendantoj. Kiam li kvar tagojn antaŭ la antaŭfiksita malfermo de la packongreso en Sheffield decidis helpe de polica teroro, al kiu li alinvitis ankaŭ elprovitajn usonajn fakulojn, doni baton al la tutmonda pacmovado, li opiniis, ke li elektis la plej konvenan momenton. Centoj da delegitoj el ĉiuj anguloj de l'mondo estis jam mar-, terkaj aerveturantaj al Sheffield, kaj al Attlee ŝajnis, ke la ĝuste ĉi-momenta malpermeso al la kongreso elvokos en la delegitoj konfuzon kaj senaplombiĝon, ke ĝi rompos ilian humoron kaj devigos ilin, dispremitajn kaj senkuraĝigitajn, revojaĝi en siajn hejmoŝtatojn. Kiel malmulte konas la servistoj de la dolaro la flamigan forton de l'ideo, kiel primitiva kaj kaduka estas ilia aritmetiko de terorminacoj! La malica ago de la angla registaro kontraŭ la pacamaj homoj de ĉiuj nacioj, asociiĝantaj por defendi la plej valoran posedaĵon de l'homaro, ne nur ne kapablis frakasi la Universalan Packongreson, sed ankoraŭ pligrandigis kaj plifirmigis en ĉiuj honordignaj homoj la porbatalan energion, malfermis la okulojn de multaj honestuloj, ĝis tiam nur neklare komprenintaj ĉiujn insidojn de l'imperiismo, montris antaŭ la tuta mondo la organizitan forton de la paca movado, kaj krome alkondukis la delegitojn de l'tuta mondo en lokon, ol kiu por packongreso ne povis ekzisti loko pli konvena — en Varsovia.

Subkapti antaŭ paso de tri tagoj centojn kaj milojn da delegitoj el la plej diversaj anguloj de l'mondo, ŝanĝi la direkton de ilia vojaĝo per la invito al Varsovio, kaj transporti ilin tien malgraŭ ĉiuj malhelpoj, farataj de la kapitalistaj registaroj, sen eĉ unusola akcidento aŭ miskompreniĝo — tiu fakto mem jam signifis grandan venkon de la porpaca movado, montrante la decidecon, antaŭvidemon kaj energiecon de ties gvidantoj, same kiel la sinceran sindonemon al la ideo defendi la pacon inter reprezentantoj de ĉiuj nacioj de l'mondo. La vojaĝo tra la popol-demokratiaj Ĉeĥoslovakio kaj Polio, kies konstruataj sukcesoj je ĉiu paŝo frapas la okulojn, novaj kaj novaj renkontiĝoj kun milkapaj popolamasoj, kore salutantaj la delegitojn kaj aklame kiantaj pacodevizaĵojn — tio estis la plej bela uverturo al la granda kaj vere historia evento, kia fariĝis la Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj en Varsovio.

Kaj Varsovio mem! Urbo elradikita de la faŝismo, urbo, kiu antaŭ paso de mallongaj kvin jaroj la kreema patoso de libera popolo sukcesis transformi al bolanta konstruejo de nova, socialista estonteco, urbo, kiu donas ĝeneralan ateston pri tio, kiel potencajn kreaĵojn fortojn malligas en libera popolo la socialismo, urbo, kiu per ĉiuj siaj muroj, per la forbruligitaj kaj per la novaj, voĉdonas por la paco — ne ekzistas honesta homa koro, kiu per tia bildo ne ardiĝus kaj ne emociiĝus! Jam enpaŝante en la kongresojn, ni sentis preskaŭ elektran tension, transsaltantan de homo al homo, de menso al menso, de koro al koro: okdek unu nacioj staris tie interligitaj en unueco, kia en la homa historio ne havas ekzemplon.

Kaj ĉiu nova horo travivita en la kongreso montris, ke temas ne sole pri unueco de sentoskuo, unueco de sopiro, sed ankaŭ pri unueco de firma volo, unueco de konkreta decidiĝo konkeri tutmondan pacon disde la malamikoj de l'homa gento. La universala pacmovado fariĝis grandega materia forto, kiu movas la naciojn de l'tuta mondo, inspiras la popolon de ĉiuj nacioj, kapablas malhelpi kaj ankaŭ malhelpos ekflagron de milita brulego.

La nacioj de l'mondo en miloj da siaj reprezentantoj kunvenis tie ne plu nur, por manifesti sian sopiron al paco, sed por konkrete serĉi rimedojn kaj batalmetodojn, kiel plifortigi la pacon, kiel altrudi ĝin al la militprovokistoj, kaj kiel fari el ĝi daŭran valoron de la tuta homa gento. Sur la plej vasta bazo, katoliko konkorde kun komunisto, blankuloj kun kolorhaŭtuloj, reprezentantoj de nacioj grandaj kun tiuj de la malgrandaj, ĉe la plej libera interŝanĝo de opinioj, ĉe la plej demokratia voĉdonado, kie inter miloj da voĉoj ne povis perdiĝi aŭ esti



MANIFESTO AL LA NACIOJ

Milito minacas la homaron — la infanojn, virinojn kaj virojn. Organizo de Unuigita Naciaro ne plenumas la esperojn de la nacioj pri konservo de kvieto kaj paco. La vivoj de la homoj kaj la akiraĵoj de l' homa kulturo troviĝas en danĝero!

La nacioj esperas, ke Organizo de Unuigita Naciaro nepre revenos al la principoj, surbaze de kiuj oni post la dua mondmilito kreis Organizon de Unuigita Naciaro, por ke ĝi sekurigu liberecon, pacon kaj reciprokan respekton inter la nacioj.

La nacioj de l' mondo tamen ankoraŭ pli multe fidis al si mem, al siaj propraj decideco kaj bona volo. Por ĉiu normale pensanta homo estas klare, ke tiu, kiu asertas: „la milito estas neevitebla“ — kalumnias la homaron.

Legante tiun ĉi mesaĝon, aprobitan je la nomo de nacioj de 80 landoj en la Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj en Varsovio, tenu en la memoro, ke la porpaca batalo estas via propra, senlime grava afero. Sciuj, ke centmilionoj da pacdefendantoj unuiĝis kaj prezentas al vi la manon. Ili invitas vin, ke vi partoprenu en la plej nobla batalo, kian la homaro iam praktikis, kredante firme je via estonteco.

Pacon oni ne atendas, pacon oni devas konkeri. Ni kunigu niajn klopodojn kaj postulu ĉesigon de la milito, kiu hodiaŭ dezertigas Koreon, sed morgaŭ minacas je brulego jam la tutan mondon.

Ni elpaŝu kontraŭ la provoj ekflamigi la fokusojn de milito en Germanio kaj Japanio.

Ni postulu kune kun la 500 milionoj da homoj, kiuj subskribis la Stokholman Alvokon: malpermeson de la atomarmilo, ĝeneralan malarmon kaj kontrolon de tiuj ĉi arandoj. Severa kontrolo de ĝenerala malarmon kaj de detruo de la atomarmilo estas praktike ebla. Estas necese sole voli.

Ni trudu, ke oni akceptu leĝojn punantajn militpropagandon. Ni prezentu al la deputitoj de niaj parlamentoj, al niaj registaroj kaj al Organizo de Unuigita Naciaro niajn proponojn pri defendo de la paco, el-laboritajn de la Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj.

La fortoj de paco estas en ĉiuj landoj sufiĉe grandaj, la voĉoj de l' homoj en la mondo estas sufiĉe fortaj, por ke ni komunklopode povu insisti pri kunveno de reprezentantoj de la kvin potencoj.

La Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj pruvis kun emfazo senprecedenca, ke homoj, kiuj kunvenis el kvin kontinentoj, povas interkonsenti por forigi suferojn de milito kaj konservi la pacon malgraŭ la diferencoj en siaj opinioj.

La registaroj agu same, kaj la paco estos savita.

preteratentata eĉ unu voĉo de la opozicio, oni en tiu ĉi kongreso entuziasme akceptis la Manifeston al la Nacioj kaj la Mesaĝon al Organizaĵo de Unuigita Naciaro, kiuj apartenas al la plej multsignifaj dokumentoj pri la historio de nia jarcento.

„Diri, ke milito estas neevitebla — signifas ofendon al la homaro“, oni diras en la Manifesto. La naŭ konkretaj punktoj de la

Mesaĝo, kies formuladon partoprenis reprezentantoj de ĉiuj okdek unu nacioj, montris klare, kiarimede kaj kiavoje oni povas malebligi la militon kaj fine forigi ĝin por eterne. Kredeble la plej glora momento de la kongreso estis la minuto, kiam Aleksandr Fadjejev je la nomo de la sovetia delegitaro kaj en la spirito de la sovetia pacokrea politiko esprimis la konkretan postulon pri

malpliigo de ĉiuj armitaj fortoj de la kvin potencoj en la venontaj du jaroj grade, samtempe kaj samproporcie je triono ĝis duono de la nuntempa stato. Granda parto de la delegitoj el la ŝtatoj de kapitalismo unuafoje en sia vivo vidis sovetianon, unuafoje senpere aŭdis voĉon de la sovetia popolo, silentigatan kaj falsatan en ilia lando fare de la registaroj kaj la koruptebla gazetaro.

Giganta ĝoja ekscitiĝo ekregis la simplajn kaj honestajn homojn el Usono, Anglujo, Italio kaj Francio: „Oni mensogis al ni“, ili ripetis denove kaj denove kun ĝojo de homo, kies okuloj malfermiĝis, tiel ke li povas mem ekoni la veron. „Mi decidiĝis, ke la tutan reston de mia vivo mi dediĉos al la porpaca batalo!“ deklaris unu el la usonaj delegitoj.

Kaj post kiam la kongresan tribunon surpaŝis la korea delegitino, Sinjorino Pak Den-aj, por liveri ateston pri la imperiista perforto, kiu atakis ŝiajn landon kaj nacion, kaj pri la necedema kuraĝo, kun kiu ŝia popolo ne ĉesos ĝis la horo de venko defendi sian liberecon, la tuta kongreso levigis por esprimi al ŝi siajn respekton kaj amon. Patrinoj de nederlandaj soldatoj, kies koroj estas turmentataj de doloro, ĉar iliaj filoj estis enkarcerigitaj, rifuzinte batali en Hindonezio, sed kies menso estas plena de fiero pro tio, ke ili havas tiajn filojn, edzinoj de polaj laboristoj kaj terkulturistoj, kies edzojn kaj infanojn murdis la faŝismo, la patrino de Zoja Kosmodjemjanskaja, kies ambaŭ infanoj oferis sian vivon en la batalo por la libereco de sia patrolando kaj la tuta Eŭropo, bulgara patrino heroino, kies kvin filoj-partizanoj falis, italaj virinoj-pacosenditinoj, patrinoj el la tuta mondo staris en tiu momento ĉe la flanko de la gracila blanke vestita virino, por kune kun ŝi esprimi sian sanktan koleron kaj sian ardan decidiĝon savi de milito la infanojn de ĉiuj nacioj. En tiu momento ni vidis plori anglajn kaj francajn virinojn, tamen tra ilia ploro elbrilis el ilia vizaĝo lumo de firma decidiĝo. En tiu momento ni ĉiuj profunde sentis, ke la tutmonda fronto de la batalo kontraŭ la malamikoj de l' homa gento ne konas limojn de ŝtatoj, nek de religioj, nek de haŭtkoloroj, sed ke ĝi trapasas rekte la korojn de ĉiuj honestaj kaj pacamaj homoj en la tuta mondo.

SPORTISTOJ DE POLIO EN LA PORPACA Batalo

Ĉe la Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj en Varsovio partoprenis en la naciaj delegitaroj multaj eminentaj sportistoj por aktive kontribui al la porpaca batalo. Post la fermo de la kongreso la plej bonaj el la polaj sportistoj adresis publikajn leterojn al siaj eksterlandaj amikoj, kun kiuj ili poste entreprenis sportbatalojn. Ekzemple la multmerita sportmajstro kaj pola piedpilka internaciulo Cieŝlik skribis al la italo Piol, la remisto Verey al la usona skifisto Kolly, la tenismajstro Skonecki al la dana tenisisto Nielsen, la pola tenismajstrino Jędrzejewska al sia sveda rivalino Gullbrandsson, la motoreiklito Suchecki al la nederlanda vetkonkuranto Metzelaar, kpt. La polaj sportistoj rememorigas la amikajn sportbatalojn, kiujn ili entreprenis kun siaj eksterlandaj rivaloj, kaj atentigas ilin, ke en Varsovio finiĝis la Dua Universala Kongreso de Pacdefendantoj. La polaj sportistoj ĝis nun ne forgesis la teruraĵojn de la mondmilito kaj ne volas denove travivi ilin. Ili invitas siajn geamikojn, ke ili aliĝu al la batalo por tutmonda paco, kiu sole ebligos prosperon de la korpedukado kaj sporto.

Adolf Malik:

VARSOVIO

Varsovia kongreso estas paca sukceso la devizo estas klara devas vivi paco kara ĉar ĝi estas necese.

Varsovia kongreso jen plej bela adreso kie sonis pacaj kantoj tra la mond' al esperantoj forta restis impresio.

Varsovia kongreso estas granda promeso por nacioj neliberaj ruĝaj nigraj kaj ceteraj ke venkos la progreso.

kiuj koncernas la plifirmigon kaj disvolvigon de paca kunlaboro inter ĉiuj nacioj. Tutmonda Pripaca Konsilantaro prenos sur sin la grandan taskon sekurigi firman kaj daŭran pacon, konforman al intereso de ĉiuj nacioj. Tutmonda Pripaca Konsilantaro donos al la homaro la certecon, ke malgraŭ ĉiuj ekzistantaj malfacilaĵoj, kiujn oni tamen ne povas subtaksi, ĝi plenumos sian mision.

Invitante Organizon de Unuigita Naciaro, ke ĝi plenumu la esperojn metatajn sur ĝin de la nacioj, ni atentigas ĝin, ke ni starigas Tutmondan Pripacan Konsilantaron. Tutmonda Pripaca Konsilantaro estos reprezenta organo konsistanta el reprezentantoj de ĉiuj nacioj de l' mondo, ĉu temas pri la nacioj, kiuj jam estas membroj de OUN, ĉu pri tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas tie reprezentataj, ĉu pri tiuj, kiuj estas ankoraŭ dependaj kaj troviĝas sub kolonia superregeco.

Tutmonda Pripaca Konsilantaro invitos Organizon de Unuigita Naciaro, ke ĝi efektive plenumu la devojn, kiujn ĝi prenis sur sin, koncernantajn la plifirmigon kaj disvolvigon de paca kunlaboro inter ĉiuj nacioj. Tutmonda Pripaca Konsilantaro donos al la homaro la certecon, ke malgraŭ ĉiuj ekzistantaj malfacilaĵoj, kiujn oni tamen ne povas subtaksi, ĝi plenumos sian mision.

TUT MONDA PRIPACA KONSILANTARO

Al la Dua Universala Kongreso de Paedefendantoj oni prezentis en la kunsido okazinta la 22an de novembro al aprobo la nomaron de la membroj, kiuj formas la Tutmondan Pripacan Konsilantaron. Tiu ĉi plej supera organo de la tutmonda pacmovado havas 206 membrojn el ĉiuj landoj de l'mondo. El la multsignifaj personoj estis proponitaj interalie la konata sovetia verkisto Ilja Erenburg, la verkisto Aleksandr Fadjejev, la verkisto Nikolaj Tihonov, la dramverkisto Aleksandr Kornejĉuk, la verkistino Wanda Wasilewska, la scienculo Aleksandr Oparin, la Metropolito Nikolaj, plue la usona verkisto Howard Fast, la kantisto Paul Robeson, la hispana pentristo Pablo Picasso, la franca verkisto Louis Aragon, Louis Sallant, Jean Laffitte, Abato Boulter, Guy de Boisson, la brita atomsciencisto Bernal, profesoro Crowther, la brita deputito Pritt, Dekano de Canterbury Johnson, la pola verkisto Jerzy Putrament, Profesoro Jan Dębowski, Profesoro Leopold Infeld, la ĉilia poeto Pablo Neruda, la iama Ĉefministro de la respublikana Hispanio José Giral, la germana poeto Johannes Becher, la bulgara profesoro Popov, la kanada profesoro pri teologio Endicott, la Prezidanto de Ĉina Komitato de Paedefendantoj Kuo Mo-ĵo, Sinjorino Sunjatsen, la brazila verkisto Jorge Amado, la Vic-Prezidanto de Tutmonda Komitato de Paedefendantoj d'Arboussier, la germana verkistino Anna Seghers, la germana verkisto Arnold Zweig, la Prezidanto de la plimulteca itala Socialista Partio Pietro Nenni, la itala senatano Sereni, la itala profesoro Domini, la Prezidanto de Rumana Komitato de Paedefendantoj akademiano kaj verkisto Sadoveanu kaj aliaj. Ĉeĥoslovakian reprezentas en la Tutmonda Pripaca Konsilantaro la Vic-Prezidantino de Nacia Parlamento Anežka Hodinová-Spurná, la Rektoro de Karlo-Universitato Prof. D-ro Jan Mukařovský, la Komisararo por Poŝtoj A. Horák kaj la laborsturmulo Bouček.

La kongresanoj aprobis la nomaron unuanime.

La Prezidanto de Socialista Partio de Italujo Pietro Nenni ĉe la fino de la kunsido esprimis dankon al la Komitato de Polaj Paedefendantoj kaj al la urbo Varsovio, al la pola registaro kaj al la tuta pola popolo, pro la gastamo, kiun ĝuis la eksterlandaj delegitoj en Varsovio, kaj plue pro tio, ke la Dua Universala Kongreso de Paedefendantoj povis en la antaŭdestinita templimo esti organizata en tiu ĉi urbo. Pietro Nenni esprimis dankon ankaŭ al Ĉeĥoslovaka Respubliko, al la ĉeĥoslovaka registaro kaj al la ĉeĥoslovaka popolo pro la helpo ĉe la transveturigo de la eksterlandaj delegitoj al la kongreso en Varsovia.

Poste la kongreso honoris la memoron pri unu el la plej grandaj porpacaj batalantoj Julius Fučík. La Duan Universalan Kongreson de Paedefendantoj fermis Pietro Nenni per la vortoj de Julius Fučík: „*Homoj, mi amis vin, maldormu!*“ Neforgesebla estas la momento. La delegitoj aplaudis, ĝojkriis, staris sur la tabloj, ŝvingis la flagetojn kaj skandis: „Julius Fučík, Julius Fučík. *Pokój, mir, mir, pacon!*“

La kongresanoj prezentis al si reciproke la manojn, ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj kantis. En la kongreshalo ekregis entuziasmo, kiun oni malfacile povas priskribi.

En la Dua Universala Kongreso de Paedefendantoj en Varsovio oni forĝis novajn potencajn armilojn por ĉiuj, kiuj amas la vivon kaj pacon, oni forĝis novajn armilojn, kiuj frakasos la planojn de tiuj, kiuj volus eksplodigi novan teruran militon. La varsovia universala pakongreso fariĝis limŝtono de la tutmonda pacmovado. En Varsovio, en la granda produktada halo de Domo de Pola Vorto, oni faris konkretajn aranĝojn por malebligigi la militon kaj konservi la pacon en la mondo.

● Ekde la 1a de oktobro oni nuligas en ĈSR la forprenadon de veturbiletaj fare de pordistoj ĉe stacidoma elirejo.

● La suma nombro da membroj de Naciaj Komitatoj, en ĈSR estas 183.720; inter tio troviĝas 25.668 virinoj, t. e. pli ol 14%.

● En Ĉeĥoslovakio estas nun 120.000 fiŝkaptantoj-sportuloj.

JURNALISTOJ LEGU!

Internacia Organizaĵo de Ĵurnalistoj publikigis alvokon, en kiu oni aprobas la Manifeston al la Nacioj aprobitan de la Ila Kongreso de Paedefendantoj. La Organizaĵo de Ĵurnalistoj admomas ĉiujn ĵurnalistojn de la mondo, ke ili per ĉiuj siaj fortoj batalu pri la principoj de tiu ĉi manifesto. La Internacia Organizaĵo de Ĵurnalistoj akcentas sian konsenton pri la postulon, ke militpropagando estu malpermesata.

Laŭ la rezolucio de la freŝdata Internacia Kongreso de Ĵurnalistoj en Helsinko la organizaĵo preparos la „pilorian noramon“ de tiuj ĵurnalistoj kiuj fariĝis militinstigantoj pere de gazetaro.

● La 21an de novembro oni laŭtlegis la reporton de la mandatkomisiono de l'Dua Universala Kongreso de Paedefendantoj. La kongreson partoprenis sume 1756 delegitoj, 192 gastoj kaj 137 observantoj; inter ili estis 446 virinoj.

Laŭ sia profesio la kongresanoj dividiĝas jene: 59 ŝtatestoj kaj parlamentanoj, 49 scienculoj de internacia signifo, 116 verkistoj kaj poetoj, 196 universitataj profesoroj, 72 diverskonfesiaj pastroj, 151 reprezentantoj de naciaj organizaĵoj, 13 gvidantoj de internaciaj organizaĵoj, 284 anoj de liberaj profesioj (ingenieroj, teknikistoj, ĵurnalisto, advokatoj, kuracistoj ktp.), 12 generaloj kaj altrangaj oficiroj, 341 laboristoj, 57 terkulturistoj, 47 industriistoj kaj komercistoj, 121 gestudentoj, 222 oficiroj kaj pliaj delegitoj de diversaj aliaj profesioj.

La meza aĝo de la delegitoj estas 33 jaroj. En la kongreso parolis sume 120 oratoroj, kaj iliaj diskursoj estis tradukataj en la lingvojn rusan, ĉinan, polan, francan, anglan, hispanan, germanan kaj ĉeĥan.

● En la tempo de la Unua Respubliko sole 2 virinoj en la ĉeĥaj landoj funkciis kiel komunumestrinoj; hodiaŭ estras komunumojn 185 virinoj kiel prezidantinoj de Lokaj Naciaj Komitatoj.

● En la jaro 1948a/49a studis en la altlernejoj de ĈSR sole 6,7% da studentoj de laborista deveno. Ĉi-jare en la ĉeĥaj landoj kandidatis la akcepton en altlernejo 40% da laboristodevenaj studentoj.

JOSEPH R. SANDY (Grand-Britujo):

1. La kongreso montris, ke la paedefendantoj reprezentas nun vere tutmondan pacmovadon. Ni ne povas plu kun demetita ĉapelo iri al la iamaj paklopodoj, sed ilia tasko estas veni al ni kaj proponi al ni siajn fortojn, sian spertaron kaj sian instruon, por ke fine la tuta homaro povu fariĝi la sola tendaro de l' paco.

2. Mi daŭrigos la klarigadon kaj instruadon, kiel mi ĉiam faris tion, kun duobla ardo, kiun alportas ĉiu nova sperto. La kongreso signifis grandan renovigon de fortoj kaj klopodoj por ĉiuj el ni, kaj ni devas strebi por esti indaj pri tio, ke ni povis partopreni en la kongreso.

FALAK TARAZI (Sirio):

1. La kunveno de senlima forto, kiu kreskas kaj plivastiĝas tagon post tago pli multe en la tuta mondo kaj kiu esprimas la deziron komunan al ĉiuj nacioj: efektiviĝi la pacon.

2. Instigite per la rezolucioj, kiuj estis de la kongreso unuanime proklamitaj, ĉiu nacia pakomitato en ĉiu lando daŭrigos la porpacan batalon laŭ siaj ebloj kaj kondiĉoj.

A. WASSERMAN (Grand-Britujo):

1. La plej karakteriza progreso de la Unua Kongreso konsistis en tio, ke multe da novaj fortoj aliĝis al la porpaca batalo. La ĉefaj decidoj kaj la Manifesto, kiujn rezultigis la Dua Kongreso, montras same ĝian maturecon kiel ankaŭ ĝian pli grandan forton. Ĝi donis celon kaj entuziasmon al multaj miloj da delegitoj kaj observantoj, kiuj partoprenis en ĝi. Nun ili revenas hejmen ankoraŭ pli pretaj por batali la pacon.

2. Mi rakontos al tiel vasta aŭskultantaro, kiel nur estos eble, la veron pri la kongreso kaj konigos al la londona popolo ties decidojn kaj rezoluciojn.

TELEGRAMO SENDITA AL

Dua Universala Kongreso de Paedefendantoj

en Varsovio.

Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko sincere salutas la Duan Universalan Kongreson de Paedefendantoj en Varsovio, kiu post la misfama sinintermeto de la brita registaro estos ankoraŭ pli bonsukcesa kaj konvinkos eĉ la lastajn ignorantojn de la pacmovado, ke la paco estos konservita, ĉar ĝi devas esti konservita, por ke la nacioj povu vivi siavole, por ke ili povu libere elkonstrui feliĉajn hejmojn por si kaj ne estu endanĝerigitaj per militoj preparataj de la militprovokistoj.

Vivu la intima interligo de la tutmondaj nacioj!

Je la nomo de l' estraro de Esperanto-Asocio en ĈSR:

Malik, Mařík.

Prago, la 17an de novembro 1950.

VÁCLAV DOBIÁŠ

naskiĝis la 22an de septembro 1909 en Radčice. Komponarton li studis ĉe Josef Suk, Bohuslav Foerster kaj Vítězslav Novák. Ĝis la fino de la mondilito li aktivis kiel instruisto. Ekde la jaro 1945a li estas tre agema kiel unuaranga organizanto en la praga muzika vivo. Dum ne mallonga tempo li estis estro de la Muzika Departemento en la Ministerio por Informoj kaj Kulturo. En la ĉi-jara oktobro oni elektis lin prezidanto de la Nacia Sekcio ĉe Asocio de Ĉeĥoslovakaj Komponistoj; li gvidas ankaŭ la Kompanion Sekcion ĉe la Supera Lernejo de Muzik-Artoj. Lastatempe li dediĉas sin intense al komponarto. Li komponis du simfoniojn kaj simfonietojn, plurajn ĉambromuzikaĵojn kaj komponaĵojn unuinstrumentajn, kantojn k. a. Honore al la venko de la Sovetia Armeo kaj al la liberigo de Ĉeĥoslovakio disde la germanaj okupaciintoj li komponis la kantatojn Stalingrad, Ordono N-ro 268 (Al la Liberigo de Prago fare de la Ruĝa Armeo), Ĉeĥoslovaka Polko, Pri la Hejma Regiono. Kaj plue multajn marŝokantojn, amas-kaj dankantojn. Lian marŝokanton „Ni Konstruas“ oni rekompencis per la unua premio en la konkurso pri la plej bona prikonstruata marŝokanto. Per la nova realisma kaj optimisma muzikstilo kaj granda muzika majstreco distingiĝas ankaŭ la piankompo-

LA VARSOVIA KONGRESO ATRIBUIS LA PACOPREMIOJN

La 22an de novembro ĉe la ferma kunsido de la Universala Kongreso de Paedefendantoj en Varsovio oni solene avisas la Pacopremiojn atribuitajn al unuarangaj majstroj de la kulturo el ĉiuj anguloj de l' mondo, kiuj per sia verko akiris multsignifan meriton en la porpaca batalo. Temas pri la plej alta honorigo, kian artistoj iam akiris, ĉar atribuas ĝin al siaj poetoj, muzikistoj, verkistoj kaj belartistoj, partoprenantaj en la kongreso kiel delegitoj, la laborularo de la tuta mondo, unuigita en la nobla luktado pri paco kaj progreso. La plej altan honorigon pere de siaj scienculoj kaj artistoj, pere de siaj eminentaj laborsturmuloj, multmeritaj patrinoj kaj la plej elstaraj batalantoj el ĉiuj sferoj de krea laboro, donas la popolo al la plej bonaj, kiuj kunmarŝas kun ĝi, por manifesti al ili ne nur siajn respekton kaj amon, sed ankaŭ la fakton, ke ĝi konscias, kion signifas la kulturo por la progreso de l'homaro.

La premiojn oni atribuis al du filoj de nia patrolando: oni premiis la verkon de la karmemora Julius Fučík Raporto Skribita sur Pendumila Ŝnuro, kaj la komponiston Václav Dobiáš por ties kantato Konstruu la Patrolandon — Vi Plifortigos la Pacon.

Pluaj laŭreatoj estas: la urbo Varsovio pro la heroa kaj optimisma konstruado, la ĉilia poeto Pablo Neruda, la itala pentristo Renato Guttuso, la negra kantisto, usonano Paul Robeson, la turka poeto Nazim Hikmet, la hispana pentristo Pablo Picasso, la aŭtoro de la Paĉkolombino, kiu fariĝis universala simbolo de la porpaca movado, la progeseama rumana verkisto Mihail Sadoveanu, la brazila pentristo Candido Portinari, la karmemora franca verkisto Jean Richard Bloch, du eminentaj filmoj, La Juneco de l' Mondo, kreita de kolektivo da sovetiaj kaj hungaraj aktivuloj, kaj Oświećcim, la glora kaj neforgesebla verko de la pola reĝisorino Wanda Jakubowska, kaj fine la progeseama libanona revuo Al Tarik, meritplene porbatalanta la pacon en la sfero de Proksima Oriento.



Julius Fučík, la postmorta laŭreato de la Pacopremio por „Raporto Skribita sur Pendumila Ŝnuro“.

JULIUS FUČÍK


El la trezorejo de nia nacia klasika literaturo ni elektis por la Konkurso pri Internacia Pacopremio verkon la plej karan al niaj koroj kaj mensoj. La eposon pri heroa batalo, sufero kaj nevenkebleco de la nio popolo. La eposon pri arda amo al la vivo, al la homo, al la libereco, al la patrolando, al krea laboro, al la paco — la verkon de Julĉjo Fučík: Raporto Skribita sur Pendumila Ŝnuro.

Estante tradukita en tridek sep lingvojn, jam delonge ĝi emocias kaj ardigas la korojn de la tutmonda popolo. En ties manojn, en la manojn de siaj „kamaradoj kaj homfratoj“, metis la ĉeĥa ĵurnalisto, kritikisto kaj verkisto tragedian ateston pri la furiozeco de la faŝismo kaj pri la monstrececo de la milito. Por ili li kantis la kanton de arda kredo je la fortoj de l' popolo, je feliĉo kaj beleco de la vivo, je la venko de socialismo. Al ili li adresis la averton, subskribitan per la propra sango: „Homoj, mi amis vin. Maldormu!“ Kaj liaj vortoj — same kiel la vortoj de ĉiu granda pensulo, batalanto kaj reviviganto — fariĝis kvazaŭ torĉo, kiu lumigas la antaŭenon por centmiloj kaj milionoj da batalantoj de la plej glora batalo en la tuthomara historio.

La maldika libreto fariĝis porbatala arsenalo, kiu provizas per nevenkeblaj armiloj: amo kaj fideleco al Sovet-Unio, sindonemo al la laborista klaso, malamo al la subpremantoj kaj eksploatistoj, kolero kontraŭ militprovokantoj, profunda sopiro pri paco, pri feliĉa kaj riĉa vivo, pri firma kredo je ĝi.

Por tiu ĉi lumo, por tiuj ĉi armiloj, por la ekzemplo de heroa kuraĝo kaj amo, kiu eĉ en momentoj de torturo kaj morto ne vidas sin mem, sed feliĉan estontecon de la popolo, — ricevas Julius Fučík, Nacia Heroo de la popol-demokratia Ĉeĥoslovaka Respubliko, Pacopremion. Jen la plej honora agnosko de nia epoko. Ovacio de amo, respekto kaj dankemo de ĉiuj, kiujn li amis. Fortega promeso, ke ili plue portos lian torĉon de vero kaj libereco.

Lianome la plej altan honorigon akiras ankaŭ nia laborista klaso, ĉar tiu estas la naskiĝa klaso de Julĉjo Fučík. Akiras ĝin la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, ĉar tiu estas lia instruanto. Akiras ĝin nia tuta patrolando, ĉar Julĉjo Fučík estas ties amata kaj amanta filo, floro kaj fiero. Kaj per ĝi plenumiĝas liaj klarvidaj vortoj: Ĉiu, kiu vivis fidele al la estonteco kaj porbatalante ties belecon falis, estas figuro skulptita el granito.



La komponisto Václav Dobiáš, laŭreato de la Pacopremio por la kantato „Konstruu la Patrolandon — Vi Plifortigos la Pacon!“

